WIKIPEDIA

Rusa lingvo

La **rusa lingvo** (ruse *ру́сский язы́к*) estas orientslava lingvo, nacia lingvo de rusoj. Ĝi estas la plej vaste parolata slava lingvo, la oka denaske plej parolata lingvo en la mondo (ĉ. 160 mln. parolantoj) kaj la kvina laŭ la tuta lingvanaro (ĉ. 260 mln. parolantoj). En 2013 ĝi iĝis la dua laŭ uzado en Interreto[27]. Rusa lingvo estas unu el la oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj estas vaste uzata kiel helplingvo en internaciaj rilatoj.

La rusa lingvo estas precipe parolata en Rusio kaj en la aliaj landoj de la eks-Sovetunio, kaj estis vaste instruata en la lernejoj de ĉiuj landoj de la Varsovia Pakto. En multaj lokoj, ene de Rusio (ekzemple en multlingva Dagestano) kaj ankaŭ ekster ĝi, rusa lingvo servas kiel interpopola komunikilo. Ĝi plu estas la dua lingvo por kelkdek milionoj da parolantoj, kvankam tiu kvanto malgrandiĝis post disfalo de Sovetunio. En la sovetia periodo post la Dua mondmilito la rusa lingvo estis forte altrudata malfavorigante lokajn naciajn lingvojn. Kvankam la plejmulto el la sendependaj landoj de la eks-Sovetio nun favoras siajn lingvojn, la rusa restas vaste parolata tie kaj estas uzata por komunikado inter tiuj landoj.

Rusa lingvo uzas cirilan alfabeton. En 1918 soveta registaro plisimpligis ĝian alfabeton; oni forigis kelkajn literojn, ŝanĝis la regulojn pri uzado de la "malmola signo" (ъ), antaŭe tre ofta litero, igante ĝin unu el la malplej oftaj. Tiu ortografia reformo estis proponita ankoraŭ antaŭ la revolucio, sed bolŝevikoj rapidigis ĝian akcepton. Laŭ oficiala politiko de rusigo meze de la 20-a jarcento tre multaj lingvoj de Sovetunio ekuzis cirilan alfabeton kaj akceptis multajn vortojn (precipe neologismojn) en la rusa.

Enhavo

Geografio
- Uzado en internaciaj rilatoj
- Dialektoj
- Lokaj variantoj
- Uzado en interreto
- Rusa lingvo en Rusio

Rusa (русский язык)

Parolata en	Rusio, Ukrainio, Estonio, Latvio, Litovio, Kazaĥio, Belarusio, Moldavio, Kirgizio, Usono, Israelo, Germanio kaj aliaj
Parolantoj	171 428 900
Denaskaj parolantoj	170 milionoj
Fremdlingvo / dua lingvo por	110 milionoj
Skribo	Cirila alfabeto

Lingvistika klasifiko

Hindeŭropa lingvaro

Slava lingvaro

Orientslava lingvaro

Rusa lingvo

Oficiala statuso

Oficiala lingvo en

Landoj:

Rusio[1][2]
Belorusio[3][4]
Kazaĥio[5][6]
Kirgizio[7][8]
Taĝikio[9][10][11]

Neagnoskitaj kaj parte agnoskitaj landoj:
Abĥazio[12][13]
Sud-Osetio[14]
Ĉednestria Moldava Respubliko[15][16]
Popola Respubliko de Donecko[17]
Popola Respubliko de Luhansk[17]

Subŝtatoj:

Moldavio:

- Gagauzio[18]

Historio
Rusigo
Lingvoscienca priskribo
Leksiko kaj morfologio
Fonetiko kaj fonologio
Strukturo de propozicio
Rusdevenaj vortoj en Esperanto
Tago de la rusa lingvo
Referencoj
Vidu ankaŭ
Literaturo
Eksteraj ligiloj

	Rumanio ▪ Distrikto Tulcea (parte) ▪ Distrikto Constanța (parte) ▪ Distrikto Suceava (parte) Norvegio: ▪ Svalbardo Ukrainio ▪ Dnipropetrovska provinco[19] ▪ Donecka provinco[20] ▪ Zaporiĵa provinco[21] ▪ Luganska provinco[22] ▪ Mikolajeva provinco[23] ▪ Odesa provinco[24] ▪ Ĥarkiva provinco[25] ▪ Ĥersona provinco[26]
Reguligita de	Instituto de rusa lingvo (Rusia Akademio de Sciencoj)
Lingva statuso	1 sekura
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	ru
ISO 639-2	rus
ISO 639-3	rus
SIL	RUS
Glottolog	russ1263
Angla nomo	Russian
Franca nomo	russe
Vikipedio	

Geografio

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Listo de ŝtatoj kaj teritorioj en kiuj rusa lingvo havas oficialan statuson.

Kiel rezulto de lingva politiko de Rusia Imperio, Sovetunio kaj Rusia Federacio la rusa fariĝis mondlingvo (unu el la plej popularaj en la mondo). Ĝi estas parolata kaj havas oficialan statuson en multaj lokoj de estinta Sovetunio.

Rusa lingvo estas tutŝtate oficiala en

- Rusio[1][2]
- Belorusio[3][4]
- parte agnoskitaj ŝtatoj: Sud-Osetio, Ĉednestria Moldava Respubliko[14], neagnoskitaj ŝtatoj: Popola Respubliko de Donecko kaj Popola Respubliko de Luhansk[17].

Ĝi ankaŭ estas oficiala lingvo de ŝtataj organoj en

- Kazaĥio[5][6]
- Kirgizio[7][8]
- parte agnoskita ŝtato Abĥazio[12][13].

Krome, en multaj landoj kaj regionoj rusa lingvo havas oficialajn funkciojn.

Rusa lingvo estas sola tutŝtata oficiala lingvo de Rusio (laŭ Konstitucio de Rusio, artikolo 68).

Uzado en internaciaj rilatoj

Rusa lingvo estas uzata en multaj plej influantaj tutmondaj organizaĵoj. Ĝi estas unu el la 6 oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj fakaj organizaĵoj (Unesko, Internacia Atomenergia Organizo, Monda Organizaĵo pri Sano, Internacia Civila Aviada Organizo, Monda Organizaĵo de Intelekta Propraĵo, Internacia Telekomunika Unio, Monda Organizaĵo pri Meteologio, Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo).

La rusa estas ankaŭ oficiala lingvo en jenaj organzaĵoj:

- Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj (sola);
- Ŝanhaja Organizo por Kunlaboro (unu el 2);
- Internacia Organizaĵo por Normigado (unu el 3);
- GUUAM;

kaj multaj aliaj.

Dialektoj

Malgraŭ tre vasta disvastiĝo, la rusa lingvo estas mirinde unueca de la dialektologia vidpunkto. Inter la kaŭzoj de tia unueco estas iam tre grandaj migradoj de homoj trans la lando kaj la rolo de skriba kaj prononca normo, popularigitaj per tutlanda radio kaj, pli poste, televido.

Oni distingas du dialektajn grupojn: la nordan kaj la sudan, zono de Moskvo estas en teritorio de mezaj dialektoj, kiuj enhavas trajtojn kaj de la sudaj, kaj de la nordaj dialektoj.

Por la nordaj dialektoj estas karakterizaj:

- ploziva prononco de fonemo /g/;
- mallongigitaj formoj de verboj en prezenco (*dumat* anstataŭ *dumajet* ks.);
- evito de fonemsinsekvo /dn/;
- odiro;
- codiro en kelkaj dialektoj;

ka.

Por la sudaj dialektoj estas karakterizaj:

- frikativa prononco de /g/;
- palatalaj finaĵoj en prezenco ([dumatʲ] anstataŭ [dumat]);
- adiro (nedistingo de /a/ kaj /o/ sen akcento);

ka.

Lokaj variantoj

La rusa, kiel aliaj grandaj lingvoj de la mondo, havas siajn parolajn variantojn (nefiksitajn oficiale kaj ankoraŭ eĉ tre malmulte esploritaj de lingvistoj) ekster Rusia Federacio – en Baltio, Belorusio, Ukrainio, Moldavio, ŝtatoj de Kaŭkazo kaj Meza Oriento. En sudorienta Eŭropo pro proksima parenceco de la ukraina kaj la belorusa lingvoj okazas tre forta intermiksado de la parolo kaj estiĝas dialektaj formoj de rusa-ukraina surĵik kaj rusa-belorusa trasjanka. Ekzemple, sur teritorio de Kirgizio rusa parolo estas sufiĉe konservativa (kaj ĝis antaŭ nelonge konservis formon de 30-aj jaroj de la 20-a jarcento). Ankaŭ en Uzbekio ĝi estas konservativa kaj konservas multajn malnovajn formojn (eĉ en parolo de ruslingvaj reprezentantoj de aliaj

nacioj – tataroj, koreoj, armenoj), kio estas ofte karaktera por "insuloj" de lingva komunumo en neparenca (tiuokaze – en neslava) lingva ĉirkaŭo. La rusa parolo ankaŭ en Kazaĥio ne vidigas spurojn de influo de la kazaĥa lingvo, tamen ĝi similas kelkajn dialektojn de Siberio. Siajn lingvistikajn specialecojn havas parolo de rusa elmigrinta diasporo (de diversaj generacioj) en malproksima eksterlando.

Uzado en interreto

Rusa lingvo estas unu el plej uzataj lingvoj en interreto. Ĝi estas vaste uzata en tuta loĝata mondo, plejparte en Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj ĉefe en Rusio. En 2013 ruslingva interreto (ruslingve nomata ankaŭ *Рунéт*, [RunEt]) fariĝis dua laŭ egeco post anglalingva: ĝin uzas 5,9 % de tuta enhavo (anglan lingvon uzas 54,7 %)[27][27].

Rusa lingvo en Rusio

Rusa lingvo estas plej populara lingvo en Rusio kaj sola tutŝtata oficiala lingvo[28]. Laŭ tutrusia popolnombrado de 2010 rusan lingvon en Rusio scias 137 494 893 loĝantoj (99,41 % de tuta respondintaro)[28].

Rusa lingvo estas nepra studobjekto en ĉiuj rusiaj mezlernejoj.

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Rusigo.

Lingva politiko de Rusio povas esti konsiderata kiel **rusigo** (perforta altrudado de rusa lingvo al ne-rusaj popoloj). Multaj aliaj etnaj lingvoj de Rusio estas endarĝeraj aŭ formortantaj aŭ mortintaj.

En Moskvo situas **Instituto de rusa lingvo je nomo de Vinogradov** — scienca organizaĵo reguliganta kaj kontrolanta kaj esploranta rusan lingvon. Pri problemoj de instruado de rusa lingvo kiel fremda okupiĝas speciala altlernejo — **Instituto de rusa lingvo je nomo de Puŝkin** (ruslingve).

1-an de septembro 2009 ekfunkciis oficiala "listo de gramatiklibroj, vortaroj, konsultlibroj enhavantaj normojn de nuntempa rusa literatura lingvo dum ĝia uzado kiel ŝtata lingvo de Rusia Federacio". Al la listo apartenas 4 libroj eldonitaj en 2008[29]:

- "Ortografia vortaro de rusa lingvo" de *Bukĉina*, *Sazonova*, *Telcova* (ruse *Орфографический словарь русского языка*);
- "Gramatika vortaro de rusa lingvo" de *Zaliznjak* (ruse *Грамматический словарь русского языка*);
- "Akcentovortaro de rusa lingvo" de *Rezniĉenko* (ruse *Словарь ударений русского языка*);
- "Granda frazeologia vortaro de rusa lingvo" de *Telija* (ruse *Большой фразеологический словарь русского языка*).

Pri tiu novaĵo informis multaj amaskomulikiloj atentiginte ke la novaj vortaroj permesis uzadon de formoj kaj akcentoj antaŭe konsideritaj kiel eraraj. Multaj rusparolantoj kontraŭis tion opiniante ke tia amasa ŝanĝado en rusa lingvo kaŭzas danĝerecon por pura lingvo; aliaj ne vidas tutan aliformiĝon de lingvo ĉar proponitaj normoj estas delonge uzataj dum rusa parolado. Multaj lingvosciencistoj kritikas ankaŭ elektadon de libroj por la listo: tien trafis hazardaj libroj ĉar oni sukcesis proponi ilin antaŭ aliaj sed ne trafis plej aŭtoritataj kaj plej grandaj[30][31].

Ĉefa konsulta ŝtatorgano estas **Konsilio pri rusa lingvo ĉe Prezidanto de Rusio** (ruse: Совéт по рýсскому языкý при Президéнте Россúйской Федерáции) fondita en junio de 2014 laŭ ordono de prezidanto Vladimir Putin kaj celanta kunordigi ŝtatan politikon pri subteno de rusa lingvo.

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Konsilio pri la rusa lingvo ĉe la Prezidanto de Rusio.

En 2007 estraro de Rusio kreis fonduson **"Russkij Mir"** ("Rusa mondo", ruse: Русский мир) por ekspansio de rusa lingvo en mondo. La organizaĵo celas popularigi rusan lingvon en mondo kaj subteni programojn pri lernado de rusa lingvo en Rusio kaj eksterlande[32].

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Russkij Mir (fonduso).

Per ordono de prezidanto de Rusio n-ro 1488 la jaro 2007 estis deklarita Jaro de rusa lingvo, enkadre de ĝi okazis kultura-klerigaj kaj sciencaj kaj edukaj aranĝoj direktitaj por popularigo de rusa lingvo kaj literaturo kaj por subteno de programoj de ilia lernado en Rusio kaj eksterlande.

Historio

La nuntempa rusa lingvo – lingvo de rusa literaturo – estis formiĝinta proksimume en fino de la 18-a – komenco de la 19-a jarcento sur la bazo de la moskva dialekto. Sekvintaj ĝiaj ŝanĝoj estis negravaj.



Titolaj paĝoj de rusa vortaro ("enciklopedia vortaro" de I. Je. Andreevskij), eldonita en 1890. Antaŭreforma ortografio.

Statuso de la rusa kiel ŝtata lingvo estis fiksita en ĉefa ŝtata leĝaro de Rusia imperio. Lenin kontraŭstaris al nepra ŝtata lingvo. Tial en Sovet-unio la rusa akiris statuson de oficiala lingvo kaj lingvo de internacia komunikado nur laŭ la leĝo "Pri lingvoj de popoloj de USSR" de la 24-a de aprilo 1990. En 1991 la rusa lingvo estis deklarita kiel ŝtata lingvo de Rusia Sovetia Federacia Socialisma Respubliko, en 1995 – ankaŭ de Belorusio.

Ĝis la 1991-a jaro la rusa lingvo estis la lingvo de internacia komunikado en Sovet-unio, fakte plenumante funkciojn de ŝtata lingvo. Ĝi plu estas uzata en la landoj, kiuj pli frue konsistigis Sovet-union, kiel la gepatra por parto de la loĝantaro kaj kiel lingvo de internacia komunikado. En lokoj de kompakta loĝado de elmigrantaro el la landoj de eks-Sovet-unio (Israelo, Germanio, Kanada, Usono k.a.) estas aperigataj ruslingvaj periodaĵoj, funkcias radistacioj kaj televidkanaloj, malfermiĝas ruslingvaj lernejoj, kie estas aktive instruata la rusa lingvo. En Israelo la rusa lingvo estas lernata en superaj klasoj de kelkaj mezlernejoj kiel la dua fremda lingvo. En la ŝtatoj de Orienta Eŭropo ĝis la fino de la 80-aj jaroj de la 20-a jc. la rusa lingvo estis la ĉefa fremda lingvo en lernejoj.

En 2006 vico da lokaj konsilioj en orientaj kaj sudaj regionoj de Ukrainio (la provincaj kaj la urbaj) havigis al la rusa sur teritorio de respektivaj administra-teritoriaj unuoj statuson de regiona lingvo. Tamen jam ĉirkaŭ fino de la jaro plimulto de tiuj decidoj estis kontestita, kaj parto de ili estis nuligitaj kiel kontraŭleĝaj. Laŭ informoj, publikigitaj en la revuo "Language Monthly" (n-ro 3, 1997), ĉirkaŭ 300 milionoj da homoj tra la tuta mondo posedas la rusan lingvon (la 5-a loko laŭ disvastiĝeco), el kiuj 160 milionoj opinias ĝin sia gepatra lingvo (la 7-a loko en la mondo).

Reformo de ortografio estis proponita komence de la 21-a jarcento, tamen ĝi ne estis realigita pro forta kontraŭstaro de verkistoj kaj publiko. La celo de la proponita reformo estis simpligo kaj reguligo de transskribo de pruntitaj vortoj (i. a. francdevenaj kiel *парашют*) kaj de punktuacio.

Rusigo

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Rusigo.

Lingvoscienca priskribo

Leksiko kaj morfologio

La rusa estas lingvo de sinteza tipo, por ĝi estas karaktera evoluinta sistemo de fleksioj kaj prefiksoj. Ekzistas kategorioj de genro, kazo kaj nombro.

Morfologio de la rusa estas tre simpligita kompare kun praslava. Al la nuna tempo la rusa lingvo fakte perdis duecan nombron, malnovan formon de vokativo. En sistemo de verbaj formoj malaperis tiuj tempoformoj, kiel imperfekto, pluskvaperfekto, aoristo kaj supino.

En la nuntempa rusa lingvo ekzistas multe da leksikaj elprenaĵoj el la Slavono, parto de kiuj kunestas kun respondaj propraj rusaj vortoj, diferencaj de la slavonaj laŭ signifo aŭ stilo. El la Slavono en la rusan literaturan lingvon estis pruntepreniitaj kaj apartaj morfemoj, kaj eĉ apartaj gramatikaj formoj – ekzemple, adverbaj participoj aŭ verbaj formoj. En sia vortprovizo nuntempa rusa lingvo havas kelkajn specifajn punktojn de krucado kun sudslavaj (kiel ankaŭ la Slavono) lingvoj, kio diferencigas ĝin de la ukraina kaj la belorusa lingvoj, kun kiuj ĝi troviĝas en la sama grupo (dum la formiĝo de leksika normo de la literaturaj ukraina kaj la belorusa lingvoj influo de la Slavono estis minimuma, sed estis tre forta influo de la pola lingvo). Kvankam laŭ la centvortaj listoj de Swadesh de la baza vortprovizo la rusa estas multe pli proksima al la ukraina kaj la belorusa (respektive 86% kaj 92% da komunaj vortoj), ol al la sudslava bulgara (74%). Komuna por la bulgara kaj la rusa lingvoj leksiko en publicista teksto estas iom pli alta, ol tiu indiko, kaj atingas 80%. Analizante tiun efekton, oni konsideru, ke ne nur la rusa pruntepreniis multajn vortojn el la slavona lingvo, sed ankaŭ la bulgara – el la rusa (en 19-20 jc.).

Leksikon de la nuntempa rusa lingvo ne malforte influis tiuj lingvoj, kun kiuj la rusa (kaj pli frue - antikvaj rusaj kaj praslavaj dialektoj) kontaktis dum longa tempo. La plej antikva tavolo da elprenaĵoj estas vortoj de orientgermana ("gota") deveno; la sekvan laŭ tempo tavolon konsistigas vortoj de la greka kaj la tjurka deveno. Dum la 16-17 jc. la ĉefa fonto de elprenaĵoj estis la pola lingvo, pere de kiu en la rusan lingvon penetris kaj granda nombro da latinaj, romanidaj kaj germanaj vortoj, kaj kelkaj propre polaj vortoj. Dum la nova periodo (ekde la 18-a jc.) elprenaĵoj venis ĉefe el la nederlanda, la germana kaj la franca lingvoj; nuntempe ĉefa fonto de la pruntepreniij estas la angla lingvo.

Siavice, ne estas malmultaj antikvaj elprenaĵoj el la rusa en lingvoj finn-ugraj (ekzemple, en la finna, la karela, la mordva k.a.). Vico da rusaj vortoj (inkluzive pruntepreniitajn laŭ deveno) iĝis internaciaĵoj, prenitaj jam el la rusa de multaj lingvoj de la mondo.

Fonetiko kaj fonologio

En neakcentitaj silaboj rusaj vokaloj estas reduktataj, kio kune kun influo de ĉirkaŭantaj konsonantoj rezultigas aperon de alofonoj. En la rusa lingvo spekteblas granda diverseco de silabaj tipoj, inkluzive V, KV, VK, KVK, VKK, KKV, KKVK, KKKV, KKKVK, KKKVKK kaj en kelkaj vortoj - eĉ tiajn maloftajn tipojn, kiel KKVKKKK.

Strukturo de propozicio

Danke al tre evoluinta sistemo de fleksioj la ordo de vortoj en la rusa lingvo ne estas fiksita kaj povas grave varii.

Rusdevenaj vortoj en Esperanto

барахтаться → barakti
хлопотать → klopodi
серп → serpo
хвост → vosto
непременно → nepre
кроме → krom
не → ne
-ар → -ar-
-чка → -ĉj-
-нька → -nj-

Sintakse, André Cherpillod rimarkigis ke la konjugacia skemo estas preskaŭ la sama.

Tago de la rusa lingvo

Tago de la rusa lingvo (ruse: День русского языка) aŭ **Puŝkin-festo (Puŝkin-tago) en Rusio** (ruse: Пушкинский день России) estas internacia festo dediĉita al la rusa lingvo kaj festata ĉiujare 6-an de junio en naskiĝtago de ruslingva poeto Aleksandr Puŝkin.

Jen kelkaj vortoj por ne-ruslingvanoj kiel gustumaĵo:

- Je nje znaju (Я не зна́ю): mi ne scias
- Je nje ponjimaju (Я не понима́ю): mi ne komprenas
- Rabota (рабо́та): laboro
- Atkritij (откры́тый): malfermita
- Glasnost (гла́сность): malfermiteco
- Kanjeŝna (коне́чно): certe
- Ĥaraŝo (хорошо́): bone
- Paĉemu (почему́): kial?
- Nepredskazujemij (непредсказу́емый): neantaŭvidebla
- Vzjatka (взя́тка): ŝmirmono
- Babuŝka (ба́бушка): avino
- Granica (грани́ца): limo
- Ulica (у́лица): strato
- Praspekt' (проспе́кт): avenuo

Referencoj

1. ↑ 1,0 1,1 La sola ŝtata lingvo je federacia nivelo. En federaciaj subjektoj estas ankaŭ kelkaj aliaj oficialaj lingvoj.

2. ↑ 2,0 2,1 Konstitucio de Rusio, artikolo 68 (http://constitution.kremlin.ru/#article-68-1) (ruse)
3. ↑ 3,0 3,1 Unu el du ŝtataj lingvoj (la dua estas belorusa)
4. ↑ 4,0 4,1 Konstitucio de Belorusio, artikolo 17 (https://archive.is/20121129053424/www.president.gov.by/press19329.html%23doc) (ruse)
5. ↑ 5,0 5,1 Oficiala lingvo; la sola tutŝtata oficiala lingvo estas kazaĥa
6. ↑ 6,0 6,1 Konstitucio de Kazaĥio, artikolo 7 (http://www.constitution.kz/razdel1/)
7. ↑ 7,0 7,1 Oficiala lingvo; la sola tutŝtata oficiala lingvo estas kirgiza
8. ↑ 8,0 8,1 Konstitucio de Kirgizio, artikolo 10 (http://www.kenesh.kg/RU/Articles/42-Konstituciya_Kyrgyzskoj_Respubliki.aspx) (ruse)
9. ↑ Lingvo de interpopola komunikado laŭ konstitucio kaj oficiala laŭ leĝaro; la sola tutŝtata oficiala lingvo estas taĝika
10. ↑ Konstitucio de Taĝikio (http://www.prezident.tj/rus/konstitutsiya.htm)
11. ↑ В Таджикистане русский язык вновь пустят в законотворчество (http://news.tj/ru/news/v-tadzhikistane-russkii-yazyk-vnov-pustyat-v-zakonotvorchestvo) — Azija-Plus, 9-a de junio 2011 (ruse)
12. ↑ 12,0 12,1 Oficiala lingvo; la sola tutŝtata oficiala lingvo estas abĥaza
13. ↑ 13,0 13,1 Konstitucio de Abĥazio (http://dpashka.narod.ru/konstitut.html) (ruse)
14. ↑ 14,0 14,1 Unu el du ŝtataj lingvoj (la dua estas oseta)
15. ↑ Unu el tri oficialaj lingvoj laŭ Konstitucio (aliaj estas moldava kaj ukraina)
16. ↑ Konstitucio de Ĉednestria Moldava Respubliko (http://www.olvia.idknet.com/constit.htm) (ruse)
17. ↑ 17,0 17,1 17,2 Unu el du ŝtataj lingvoj (la dua estas ukraina)
18. ↑ Закон «Об особом правовом статусе Гагаузии (Гагауз Ери)» (http://lex.justice.md/index.php?action=view&view=doc&lang=2&id=311656) (ruse)
19. ↑ Русский язык стал региональным в Днепропетровской области (http://korrespondent.net/ukraine/politics/1384621-russkij-yazyk-stal-regionalnym-v-dnepropetrovskoj-oblasti) (ruse)
20. ↑ Русский язык объявили региональным в Донецкой области (http://news.zn.ua/SOCIETY/russkiy_yazyk_obyavili_regionalnym_v_donetskoy_oblasti-107093.html) — «Зеркало недели», 16 августа 2012 года.
21. ↑ Русский язык стал региональным для Запорожской области (http://korrespondent.net/ukraine/politics/1384181-russkij-yazyk-stal-regionalnym-dlya-zaporozhskoj-oblasti), korrespondent.net, 16-a de aŭgusto 2012 (ruse)
22. ↑ Русский язык получил официальный статус в Луганской области (http://lenta.ru/news/2012/08/17/language/), Lenta.ru, 17-a de aŭgusto 2012 (ruse)
23. ↑ Николаевский облсовет сделал русский язык региональным (http://novosti.dn.ua/details/186253/) — Novosti Donbasa, 7-a de septembro 2012 (ruse)
24. ↑ Одесская область предоставила русскому языку статус регионального (http://un.ua/rus/article/405772.html) (ruse)
25. ↑ Русский язык стал региональным в Харьковской области (http://www.unian.net/news/522557-harkovskiy-oblsovet-soobschaet-chto-russkiy-yazyik-yavlyaetsya-regionalnyim-v-oblasti.html) (ruse)
26. ↑ Русский язык получил статус регионального в Херсонской области (http://dozor.kharkov.ua/zhizn/politika/1112391.html) (ruse)
27. ↑ 27,0 27,1 27,2 Русский язык стал вторым по популярности в интернете (http://lenta.ru/news/2013/03/21/strussian/), Lenta.ru, 21-a de marto 2013 (ruse)
28. ↑ 28,0 28,1 Loĝantaro de Rusio laŭ lingvoscio (http://www.gks.ru/free_doc/new_site/population/demo/per-itog/tab6.xls), rezultoj de la tutrusia popolnombrado de 2010 (ruse)

29. ↑ Oficiala teksto de ordono (http://www.rg.ru/2009/08/21/russkiy-slovari-dok.html) (ruse)
30. ↑ Кофе теперь среднего рода (http://www.dv-reclama.ru/others/news/11084/spisok_slovarey_grammatik_spravochnik_normy_sovremennogo_russkogo_literaturnogo_yazyka/), artikolo kaj diversaj opinioj (ruse)
31. ↑ Леонид Крысин, Мария Каленчук, заместители директора Института русского языка им. В.В. Виноградова РАН (http://lenta.ru/conf/ruslang/), artikolo kaj diversaj opinioj (Lenta.ru, ruse)
32. ↑ Pri la fonduso (http://www.russkiymir.ru/fund/about.php) (ruse, angle, hispane, france, germane, itale, ĉine)

Vidu ankaŭ

- Ruslingva literaturo
- Esperanto-rusa vortaro
- Esperantigo de vortoj el rusa kaj ukraina fontoj
- La rusa lingvo en vivo *(lernolibro pri praktika uzado de la rusa lingvo)*

Literaturo

- *Monato*, internacia magazino sendependa, numero 1993/04, paĝo 20: *La rusa* verkita de Bradley Kendal.

Eksteraj ligiloj

- Tre aktiva dulingva rusa-Esperanta forumo ĉe e-novosti.info (http://e-novosti.info/forumo/) (multaj temoj pri la rusa kaj aliaj slavaj lingvoj)
- Gramota.ru: granda ruslingva servilo pri la rusa lingvo (http://gramota.ru)
- La rusa lingvo ĉe ethnologue.com (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=RUS)
- Kiel tajpi ruse (http://ruswin.net)
- Paĝaro pri antikva rusa literaturo (http://drevne.ru)
- Rusa klavaro (http://www.microsoft.com/globaldev/keyboards/kbdru.htm)
- Russky.info (https://russky.info/eo) – multlingva retejo por lerni la rusan
- Kantu ruse: kurso por infanoj kaj iliaj gepatroj (https://beta.wikiversity.org/wiki/Kantu_ruse:_kurso_por_infanoj_kaj_iliaj_gepatroj) esperante

Slava lingvaro		
Okcidentslavaj	ĉeĥo-slovakaj (ĉeĥa lingvo • slovaka lingvo • knaana lingvo) • soraba lingvo (suprasoraba lingvo • malsuprasoraba lingvo) • leĥaj lingvoj (pola lingvo • pomoria lingvo (kaŝuba lingvo • slovinca lingvo) • polaba lingvo)	
Sudslavaj	okcidentaj sudslavaj lingvoj (kroata lingvo • bosna lingvo • montenegra lingvo • slovena lingvo • serba lingvo • serbokroata lingvo) • orientaj sudslavaj lingvoj (makedona lingvo • bulgara lingvo • malnovslava lingvo) ...	
Orientslavaj	belorusa lingvo • ukraina lingvo • rutena lingvo† • rusina lingvo • rusa lingvo • Malnova Novgoroda dialekto†	

Oficialaj lingvoj de Rusio	
Tutŝtata oficiala (ŝtata) lingvo	rusa (→)

Lingvoj oficialaj (ŝtataj) en federaciaj subjektoj	abaza · avara · agula · adigea · azerbajĝana · sudaltaja · baŝkira · burjata · dargva · inguŝa · kabarda-ĉerkesa · kalmuta · karaĉaja · komia · kumika · laka · lezga · nogaja · maria · mokŝa · oseta · rutula · tabasarana · tatara · tata · tuva · udmurta · ĥakasa · caĥura · ĉeĉena · ĉuvaŝa · erzja · jakuta
Lingvoj kun oficiala statuso	vepsa · dolgana · kazaĥa (→) · karela · komipermjaka · mansa · neneca · selkupa · finna · ĥanta · ĉukĉa · evenka · evena · jukagira

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Rusa_lingvo&oldid=6836289"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 04:11, 12 jan. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.